# NSiR - Nova Sento in Rete
# N. 1181 (27/2023)


Aperiodico della Federazione Esperantista Italiana
Federazione Esperantista Italiana: posta fei@esperanto.it ; internet http://www.esperanto.it
Itala Esperantista Junularo: posta iej@esperanto.it ; internet http://iej.esperanto.it
Via Villoresi, 38 IT-20143 Milano Tel 02 58100857

Mandate i vostri contributi a: Norberto Saletti, notiziario@esperanto.it
indicando nell'oggetto "Per Nova Sento in Rete"
NON RISPONDETE AL MESSAGGIO CON CUI ARRIVA NSiR
I messaggi che arrivano al sistema non vengono gestiti.
Le lettere non firmate non saranno pubblicate.
Tutto il materiale distribuito da NSiR è riproducibile citandone la fonte.
**ISCRIVETEVI ALLA FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA**
http://www.esperanto.it/iscrizione-fei.htm
**LIBRERIA**
http://www.esperanto.it/libri.htm
feilibri@esperanto.it
**INCONTRI ESPERANTISTI IN ITALIA**
Il Congresso Nazionale: http://kongreso.esperanto.it
Il Festival Giovanile di Pasqua: http://iej.esperanto.it/ijf
**BIBLIOTECA DI MASSA**
https://reprobi.erasmo.it
**IL 5 PER MILLE ALLA FEI**
Indicate il codice IVA **94006900024* (Gruppo E-ista Vercellese)**

*Indice articoli*

Datreveno de Zamenhof, kaj Tago de la Libro .......... 2
Ni tostis je la sano de la Majstro .......... 3
Denove la UK! .......... 3
Addio a Fiorella .......... 3
Rai Radio 1 .......... 4
Norma di nuovo in tv .......... 4
Tago de la Libro .......... 4
Scienca pruvo, ke Paĉjo Kristnasko ne ekzistas .......... 5

## DATREVENO DE ZAMENHOF, KAJ TAGO DE LA ESPERANTO-LIBRO




Libroj, en ajna lingvo, kaj aparte la esperantlingvaj (ĉi supre la Unua), estas multe pli ol aro da folioj plenaj je simboloj, kiuj rakontas iun ajnan temon.

Libroj estas vivsaviloj, ĉefe en tiu ĉi epoko, kiam ni delegis al la teknologio grandan parton de niaj vivoj. Sen via poŝkakulilo, kiom da vi povas fari eĉ simplan adicion de kvinciferaj numeroj, nur en via menso (ne trompu, sed vi rajtas uzi paperon kaj krajonon)?

Sen via poŝtelefono, kiom da vi kapablas rememori la numeron de amiko kiun vi ne vidas jam kelkajn jarojn, kaj, foje, eĉ ties nomon?

Kiom da vi povas, sen via poŝmaparo, atingi perfekte konatan adreson, kien vi ne iras jam kelkajn semajnojn?

Kiom da enŝutvortojn kaj kodojn vi memoras, pri bankkonto, poŝto, se hazarde vi havus plastron sur la fingro kiun vi uzas por atingi tiujn paĝojn?

En kiun abismon da teroro vi profundiĝus, se baterio de via poŝtelefono pereus abrupte?

Kiam vi partoprenas baloton aŭ referendumon, ĝis kiu punkto vi certas pri la vereco de la retaj/retsociaj fontoj sur kiuj vi baziĝas por decidi?

Tro ofte, ni agas sen nin pridemandi, sed simple komfortiĝe rigardante al speguloplena fermita ĉambro, kie ni serĉas nur tion, kion ni jam konas, inkluzive nin mem.

Libroj estas teknologio malnova, kompare al la nuntempe svarmanta artefarita inteligento: sed ili permesas al ni malakceli, pensi, pripensi, dubi (mia preferata agado!), pesi la argumentojn, kritiki, esti mense aktivaj! Ne gravas la konkludoj, se ili estas niaj, kaj ne kopiitaj, pasive ricevitaj kaj ne aktive ellaboritaj. Libro lasas al ni unu el la plej altvaloraj varoj: la tempon. Tempo por ni, por imagi, por vojaĝi al, en, tra mondoj kiujn oni nur sugestas al ni, per la vortoj de l'aŭtoroj, kaj ni plenigas la malplenojn, la vizaĝojn, la lokojn, la emociojn.

Cetere, libroj havas vivon multe pli longan ol tiu de la novaj teknologioj: ankoraŭ eblas legi ion, kion egiptaj skribistoj surpapirusigis antaŭ 4000 jarojn, sed mi –ekzemple- ne plu povas remalfermi arĥivon kiun mi starigis per ne plu ekzistanta programo fine de la Okdekaj Jaroj.

Feliĉan Tagon de la Libro(j)! Kaj... ne nur aĉetu ilin, ĉar la kovrilo ĉarmas! Ankaŭ ilin legu!

## NI TOSTIS JE LA SANO DE LA MAJSTRO!

Ĉu vi perdis la hieraŭan feston! Ĉu vi volas respekti ĝin? Jen la ebleco ĉe YouTube https://youtu.be/gDrGmTMnbxo

## DENOVE LA UK!

Ecco un bellissimo filmato sul 108° Congresso!

https://www.youtube.com/watch?v=a0KQTswM6ys

## ADDIO A FIORELLA

A esequie avvenute si dà la notizia della dipartita, il giorno 11.12, della socia Fiorella Pizziolo in Minnaja, di anni 86, moglie del socio onorario Nicola Minnaja. Chi volesse partecipare al lutto della Famiglia può inviare un messaggio al figlio di Nicola e Fiorella, Carlo Minnaja, all'indirizzo carlo.minnaja@fastwebnet.it (da

non confondere con il mio). Probabilmente alcuni soci si ricorderanno di aver visto Nicola accompagnato dal figlio Carlo al congresso di Trieste qualche anno fa.

Carlo Minnaja

## RAI RADIO UNO


Oggi 15 dicembre, Zamenhofa Tago, avrà l'esperanto come protagonista a **Rai Radio 1 alle ore 23.45 circa** con "**Quanto attuale oggi è il messaggio di Zamenhof?**" Grazie a Paola Nigrelli e Aldo Grassini che ascolteremo.
Non dimenticate di sintonizzarvi. Buon ascolto!

## NORMA DI NUOVO IN TV

Super Norma ha colpito ancora...

https://drive.google.com/file/d/111m-k4qVMpIY2YzYvDpdj3fY0TIE43QV/view?usp=sharing

## TAGO DE LA LIBRO



## SCIENCA PRUVO, KE PAĈJO KRISTNASKO NE EKZISTAS

Neniu konata specio da rangifero kapablas flugi. Tamen ekzistas 300.000 specioj da vivantaj estaĵoj ankoraŭ ne klasifikitaj, kaj, dum plejparto da ili estas insektoj kaj ĝermoj, tio ne ekskludas entute la ekziston de flugantaj rangiferoj, kiujn tamen nur Paĉjo Kristnasko vidis.

Estas du miliardoj da infanoj (sub 18 jaroj da aĝo) en la mondo. Pro tio ke Paĉjo Kristnasko ne komercas kun ĉiuj religioj, la laborŝarĝo reduktiĝas al ĝis 15 el cento de la tuto, nome 378 milionoj. Je averaĝo de po 3,5 infanoj por familio, jen totalo da 98,1 milionoj da loĝejoj. Eblas supozi ke estas minimume unu bonkonduta infano por familio. Paĉjo Kristnasko havas 31 laborhorojn, danke al la horzonoj kaj al la rotacio de la Tero, alprenante kiel fakton ke ĝi rotacias de Oriento al Okcidento. Tio gvidas nin al kalkulo de 822,6 vizitoj por sekundo. Tio signifas ke, por ĉiu kristana familio kun almenaŭ unu bonkonduta infano, Paĉjo Kristnasko havas pli malpli milonon da sekundo por:

- Trovi parklokon (tio simplas, ĉar li povas halti sur la tegmento, kaj ne havas problemojn je parkmalpermesoj);
- Eliri la sledon;
- Malsupreniri laŭ la kameno;
- Plenigi la ŝtrumpojn;
- Disdoni la ceterajn donacojn sub la kristnaska arbo;
- Manĝi tion, kion la infanoj disponigis por li;
- Resupreniri la kamenon;
- Restarti por la sekva alvenpunkto.

Supozante ke la loĝejoj estu uniforme distribuitaj (kion ni scias esti malvera, sed ni tion akceptos por kalkulsimpleco), ni parolas pri 1,248 Kilometroj por ĉiu halto, por totala vojaĝo de 120 milionoj da kilometroj. Tio implicas ke la sledo de Paĉjo Kristnasko vojaĝas pli malpli je 1040 kilometroj por sekundo, 3000 fojojn la rapideco de la sono. Por komparo, la spacsondilo *Parker* (la plej rapida homa inventaĵo) vojaĝas apenaŭ je 176,46 kilometroj por sekundo, kaj averaĝa rangifero je pli malpli 30 kilometroj por horo.

La ŝarĝo de la sledo aldonas plian interesan elementon: supozante ke ĉiu unuopa infano ricevas averaĝan LEGO-skatolon (pezanta pli malpli 1 kilogramon), la sledo portas pli malpli 378.000 tunojn, sen kalkuli Paĉjon Kristnaskon (kiu, kiel konate, estas superpeza). Sur la Tero, rangifero povas ekzerci trakciforton de pli malpli 150 Kilogramoj. Eĉ supozante ke fluganta rangifero povus treni dekoble tion, ne eblas movi tiun sledon per nur 8 aŭ 9 rangiferoj, bezonatus io kiel 214.000. Tio portas la pezon al 575.620 tunoj, ne enkalkulante la sledon. Por kompari, tio estas 4 fojojn la pezo de la krozŝipo Queen Elizabeth la Dua.

Certe, 575.620 tunoj kiuj vojaĝas je 1040 kilometrojn por sekundo estigas enorman reziston. Tiu rezisto varmigos la rangiferojn samkiel okazas al kosmoŝipo reeniranta la atmosferon. La gvida paro da rangiferoj sorbos do 14,3 kvintilionojn da ĵuloj por sekundo. Tre rapide tiu paro vaporiĝos preskaŭ tujtuje, ekspoziciante la duan paron kaj kreante surdigajn sonajn puŝondojn (bang).

La tuta teamo vaporiĝos ene de 4,26 milonoj da sekundo.

Konklude: Paĉjo Kristnasko ne ekzistas.